

V-19479/46 (1977)

N. 24,6-9

ESPERANTO

Bulgara ESPERANTISTO





Ĉe la konono (vidu paĝon 12).



Sukcesa E-kurso por perfekte tigo, organizita de la Jurista Sekcio de BEA en Sofio. Kursgvidanto Genčo Genčev (sidanta meze maldekstre).

GRAVA:

Ni varme rekomendas revuon „Der Esperantist“ — organo de Centra Liberrondo Esperanto de Germana Demokratia Respubliko. Jere aperas 6 numeroj, abonotizo 1,0 bulgari levo. Sumo sendu per poŝtmandato aĉreso: 1303 Sofio, ul. Oŝlčenska 15, Jerčen Ĉalovs'i.

ENHAVO

Akad. Georgi Naĝakov. La paco — nia nobla celo	1
* * * Granda literatura konkurso	3
* * * Akademiano G. Naĝalov 80-jara	3
* * * Adreso de CE de BEA al akad. G. Naĝakov	3
Ivan Craganov Kara konaco	4
* * * Amare tra la lando Zamenhof-celebroj	6
Kr. Karucin. Festo de la Esperanta libro	7
* * * Distingita esperantisto	7
* * * Georgi Dolapčiev 70-jara	8
* * * Georgi Dimov 70-jara	9
KV. Literatura vespero pri Asen Grigorov	11
Ĥristo Marinov. Volentulo de la libero	12
Nikola Nikolov. Por amasa E-turismo	14
Maria Posluŝna. Kunveno pri Bulgario en Pollando	14
D. Haĝiev. Ĉeĥoslovacio tridekjara sur la vojo de socialismo	15
Nadja Trerdafilova. Rapida telegramo	15
Elvira Lippe. Verboj. Sango	16
Asen Grigorov kaj Veselin Damjanov. Mia kolekto (kanto)	III

Sur la kovrilpaĝo:

La Palaco de Sporto kaj Kulturo en Varna — la kongresejo de la 63-a UK de Esperanto en 1978.

Redakta komitato:

Kunčo VÁLEV (ĉefredaktoro), Nevena ALEKSIEVA, Marin BĂŢEV, Luba BOJAĜIEVA, Ĥristo GÖROV, Asen GRIGOROV, Dimitro DENČEV, Dimitro HAĜIEV, Krăstju KARUCIN, Haim LEVI, Vasja PETROVA.

Korektis: Vasja Petrova

Sofio, p. k. 66

Tel. 31-00-29

**LA PACO — NIA NOBLA CELO**

Akademiano GEORGI NAĜAKOV,

*popola aganto de la scienco, heroo de la socialisma laboro,
honora prezidanto de la Nacia Pacdefenda Komitato*

Ni vivas en ekskluzive dinamika epoko. Ni estas atestantoj de ŝanĝoj okazantaj ĉie en la mondo. En Sovetunio, en nia lando kaj en la ceteraj landoj de la socialisma komunismo tiuj ŝanĝoj estas en pozitiva direkto. Dum du-tri jardekoj Bulgario igis nereconebla kompare kun sia proksima pasinteco. Ekestis rimarkinda supreniro en la konstruado kaj industrio, en la vilaĝmastrumo, en la kulturo kaj scienco kaj en la vivo de la homoj. Ĉio ĉi montras, kiom forta estas la tirpovo, kiu suprenigas nian popolon dank' al la krea politiko de la Komunista Partio kaj la ŝtato.

La grandaj sukcesoj de Sovetunio, de nia lando kaj de la ceteraj landoj de la socialisma komunismo venis nek subite, nek hazarde. Ili rezultigas antaŭ ĉio el la konsekvenco interna kaj ekstera politiko de la partioj-gvidantoj en la frataj socialismaj landoj, el la senlaca agado de la Komunista Partio de Sovetunio kaj ĝia unua gvidanto L. I. Breĵnev, el la kunorditaj agoj de la ŝtatoj el la socialisma komunismo plenumo al la rimarkinda paca programo de KPSU. Nome al tiuj ĉi penadoj ŝuldiĝas la pacaj cirkonstancoj, ĉe kiuj ni vivas jam pli ol tri jardekojn.

La konservo de la paco en Eŭropo ŝuldiĝas altgrade ankaŭ al tiuj progresemaj socifortoj, kiuj jam tuj post la fino de la Dua Mondmilito unuiĝis en potencajn progresemajn organizojn kiel tiu de la demokratiaj sindikatoj, de virinoj, junuloj, intelektuloj, sciencistoj, juristoj-demokratoj kaj multaj aliaj por kontraŭstari al la imperiisma minaco kaj al la t. n. „malvarma milito“. Grandajn meritojn tiurilate havas ankaŭ la monda movado por defendo de la paco, kiu fondiĝis laŭ iniciato de kelkaj el tiuj progresemaj organizoj. Tiu ĉi movado, frunte de kiu ekstaris la granda sciencisto Frederik Jolio Kjuri (Curi), mobilizis ĉiujn popolojn pere de la fama Stokholma Alvoko kontraŭ la atomminaco, sub kiu alvokon metis sian subskribon 500 milionoj da konsciaj homoj el la tuta mondo. La deziro de la popoloj vivi en paco kaj komprenigo estis klare manifestita ankaŭ nun post 25 jaroj, kiam estis metitaj kaj plue metataj milionoj da subskriboj sub la duan Stokholman Alvokon.

Dank' al grandaj fortouzoj iom post iom estis venkitaj la grandaj malfacilaĵoj, kaŭzitaj de „la malvarma milito“, de la imperiista minaco kaj de la malamika propagando de la okcidenta reakcio. Dum la lastaj kelkaj jaroj kreiĝis atmosfero de grava politika malstreĉeco, kies pinton markas la Fina Akto de Helsinki, sub kiu staras la subskriboj de la gvidantoj de 33 eŭropaj ŝtatoj kaj de Usono kaj Kanado.



Laŭ komuna pritakso tamen, por ke la politika malstreĉeco fariĝu nere-
turnebla proceso, ĝi devas esti kompletigita ankaŭ per milita malstreĉeco.
Kaj la milita malstreĉeco montriĝis problemo tre malfacile solvebla, malgraŭ
la renkontigoj je plej alta nivelo kaj la intertraktadoj. La konkurado en la
armigo daŭras kun ĉiam pli rapida ritmo. La militbuĝetoj atingis la gran-
degan sumon de pli ol 300 miliardoj da dolaroj jare, la rezervoj de nuklear-
miloj atingis 100 milionojn da tunoj da ekvivalenta trotileksplodaĵo, kiu estas
sufiĉa por multfoje neniigi la tutan homaron.

La monda pacama publiko jam dum jaroj diskutas ĉiujn ĉi problemojn,
aparte aktive post la Tuteŭropa Konferenco en Helsinki. La rekomendoj de
ĉiuj ĉi forumoj de la paco resumigas en la neceso pri kunvoko de tutmonda
konferenco pri la problemoj de malarmigo, kiun partoprenu ĉiuj ŝtatoj. De tiu
konferenco oni atendas multon. Nun granda evento estas la monda forumo de
la pacamaj fortoj en Moskvo.

Oni jam prenis decidon pri okazigo de monda asembleo de la pacama
publiko en Varsovio, kiu helpas la registarojn preni ĝustan decidon pri la
starigitaj problemoj.

Antaŭ la progresemaj socipolitikaj organizoj staras la granda tasko pri
ankoraŭ pli plena mobilizo de la monda progresema publiko en batalo por ĉesigo
de la konkurado en armigo kaj por malarmigo. Antaŭ nia Asocio de Scien-
cistoj en Bulgario kaj antaŭ la tutmonda sciencistaro, unuigita en la Monda
Federacio de Sciencistoj, same antaŭ la Pâguâs (Pugwach)-movado de
sciencistoj, batalantaj por paco kaj internacia interkomprenigo, staras la im-
perativo doni sian kontribuon por sukcesa solvo de la problemo pri la mal-
armigo.

De la decidoj laŭ ŝtata, interregistara linio dependos en plej alta grado
la proksimiĝo de la homaro al mondo sen militoj kaj militminacoj, al mondo,
kie la kreaĵ fortoj de la popoloj kondukos al komuna bonstato, por ke mal-
aperu la mizero, malsato kaj malriĉeco el la vizaĝo de la tero, por ke la gran-
daj nuntempaj atingoj de la scienca kaj teknika progreso direktiĝu nur al
bonstato — ilia vera destino.

De ni, de la homoj de la scienco, oni postulas mobilizi niajn fortojn por
pli grandaj akiroj, ke ni atingu pli altajn suprojn de la sciencaj konoj per
niaj eltrovoj, enkondukitajn en la praktikon, ke ni helpu la bonegan nialan-
dan socialisman konstruadon kaj puŝu al pli alta nivelo la sciencan kaj kul-
turan prestiĝon de nia popolo en la mondo.

De ni oni samtempe postulas esti ankoraŭ pli aktivaj reprezentantoj de
nia socialisma socio helpe al la althumana krea politiko de niaj partio kaj
ŝtato, al la partia kaj ŝtata gvidantaroj frunte kun la unua sekretario de CK
de BKP kaj prezidanto de la Ŝtata Soveto k-do Todor Jivkov.

Nia nobla celo devas esti la ankoraŭ pli granda kontribuo al la disvolvado
de nia scienco helpe al la krea interna kaj ekstera politiko de BKP kaj de
nia socialisma patrolando.

El j. „Rabotniĉesko Delo“, 6. I. 1977

URĜA!

GRAVA!

Abono al «Bulgara Esperantisto» ankoraŭ estas ebla pere de la asocia kancelario.
Abonu! Abonigu!

Sumojn sendu per poŝtmandato je adreso: 1303 София, бул. Христо Ботев 97,
Български есперантистки съюз, ДСК Благоевски район, с/ка 185/1052.

Aparte sendu nomaron de la abonantoj.



Lige kun la 90-jariĝo de Esperanto, la 70-jariĝo de Bulgara Esperantista Asocio kaj la 60-a datreveno de la Granda Socialisma Oktobra Revolucio «Bulgara Esperantisto» anoncas grandan literaturan konkurson. Ĝin povas partopreni ĉiu esperantisto — bulgara aŭ alilanda — per originalaj verkoj (poezio, rakontoj, eseoj, rememoroj kaj tradukita poezio) lige kun la cititaj eventoj.

Limtempo por prezento de la konkursaĵoj: la 15-a de junio (validas la poŝta stampo).

La plej bonaj verkoj estos premiitaj kaj aperos en «Bulgara Esperantisto».

La konkurso estas sekreta. La maŝine tajpitaj materialoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. La saman pseŭdonimon oni skribu ankaŭ sur fermita koverto, en kiun oni anticipe metu slipon kun la vera nomo kaj adreso de la aŭtoro. La konkursaĵojn kaj la fermitan koverton oni metu en pli grandan koverton, ankaŭ subskribitan per la sama pseŭdonimo, kaj ĉion sendu rekomendite je adreso: „Bulgara Esperantisto“, bulv. Ĥristo Botev 97, 1303 Sofio, Bulgario (por la konkurso).

La 6-an de januaro en la Granda Halo de la Bulgara Akademio de Sciencoj okazis impona solenaĵo omaĝe al akademiano Georgi Naĝakov lige kun lia 80-jariĝo. Partoprenis ministroj, la patriarko, akademianoj, sciencistoj, civitanoj.

Akademiano Angel Balevski, prezidanto de la Akademio kaj membro de la Ŝtata Soveto, dekoris la jubileulon per la plej alta ordeno en nia lando — „Georgi Dimitrov“. La Popola Registaro distingis triafoje akad. Naĝakov pro liaj grandaj meritoj sur la kampo de la fizika scienco kaj pro lia socia agado. Oni tralegis la salutleteron de k-do Todor Ĵivkov — unua sekretario de CK de BKP kaj prezidanto de Ŝtata Soveto de Popola Respubliko Bulgario.

Salutis la jubileulon reprezentantoj de pli ol 60 ŝtataj kaj sciencaj instancoj kaj sociaj organizaĵoj.

Je la nomo de la Bulgara Esperantista Asocio mesaĝon tralegis ing. Angel Todorov — sekretario de BEA. Akad. Georgi Naĝakov per tre sinceraj vortoj akceptis la gratulon de la bulgaraj esperantistoj.

ADRESO DE CE DE BEA AL AKADEMIANO GEORGI NAĜAKOV

Kara kamarado Naĝakov,

En la nomo de ĉiuj esperantistoj en nia lando la Centra Estraro de Bulgara Esperantista Asocio salutas varme Vin lige kun Via 80-jara jubileo. Ni fieras pri Viaj sukcesoj en la fizika scienco, akirintaj mondan rekonon. Ni same fieras kaj profunde ĝojas, ke malgraŭ Via okupateco pri sciencaj esploroj kaj socia agado Vi pli ol duonjarcenton trovis tempon labori ankaŭ por realigo de la ideo de neŭtrala internacia lingvo, kia estas Esperanto, kiun Vi ellernis jam antaŭ jardekoj.

En Via sociagado kiel prezidanto de la Nacia Komitato de la Paco kaj kiel membro de la Monda Packonsilio Vi subtenis la Mondpacan Esperanto-Movadon kaj ĝian bulgaran komitaton. Kun preteco Vi kelkfoje verkis artikolojn por ĝia organo „Paco“. En 1972 j. Vi publikigis artikolon en la bulgara gazetaro, en kiu pasie kaj argumentite defendis la koncepton, ke estas necesa komprenebla de ĉiuj internacia lingvo, kreita laŭ arta maniero surbaze de la principoj de ĝenerala lingvistiko, ke tia lingvo estas Esperanto kaj ke UNO devas starigi por diskutado ĝian instruadon en la lernejoj de la landoj-membroj.

Via subteno al Esperanto kaj la Esperanto-movado estis ĉiam stimulo por la bulgaraj esperantistoj uzi ĉiam pli insiste la Internacian Lingvon serve al la paco kaj la socialismo.

Refoje ni salutas Vin, kamarado Naĝakov, kaj deziras al Vi ankoraŭ multajn, multajn jarojn kontribui por la gloro de nia socialisma patrolando.

Sofio, la 6-an de januaro 1977

*Centra Estraro de Bulgara
Esperantista Asocio*



KARA DONACO

Foje mi bezonis iun libron kaj supozante, ke mia amiko Stefan posedas ĝin, mi direktiĝis al lia hejmo. Li havis bone ordigitan riĉan bibliotekon.

Vidinte min Stefan ĝoje ekkriis. Tuj li trovis la necesan al mi libron. Post tio komenciĝis nia amika konversacio. Mi aŭskultis atente liajn parolojn, sed li rimarkis, ke mi samtempe ĵetas rigardon al lia bufedo, kie estis ordigitaj flavkoloraj, bonodoraj grandaj cidonioj.

— Kio tiel interesas vin? — li demandis. — Ĉu la cidonioj? Ho, tiuj ĉarmaj fruktoj rememorigas al mi pri miaj instruistaj jaroj. Pro tio ili konstante okupas honoran lokon en mia hejmo. Ĉu vi volas ekscii ion pli pri miaj inklino al la cidonioj? Mi tuj klarigos ĉion al vi.

Kaj Stefan komencis interesan rakonton, de tempo al tempo interrompata de miaj demandoj kaj interjekcioj.

— Vi scias, ke mi pasigis mian tutan vivon kiel instruisto. Multon mi vidis kaj multon mi travivis, sed tio, kun kio estas ligitaj la cidonioj, restis ĉiam freŝa en mia memoro. Ĝi okazis, kiam mi estis tute nova instruisto en unuagrada lernejo en urbo N. Tie oni komisiis al mi instrui unuaklasanojn. Mi komencis entuziasme kaj kun granda amo apliki praktike tion, kion mi estis lerninta en la pedagogia instituto. Tia amo al la instruista laboro certe naskiĝis ankaŭ pro la fakto, ke ĉiuj miaj familianoj estis instruistoj — miaj gepatroj, mia fratino kaj mia frato.

La unua mia tasko estis viziti la domojn de miaj gelernantoj, konatiĝi kun iliaj gepatroj kaj akurate kontroli, ĉe kiaj kondiĉoj ili vivas. Poste tio treege helpis min dum mia laboro. En speciala kajero mi notis la inklinojn kaj la karakterajn trajtojn de miaj edukatoj.

Dank' al tio la sukceso de la klaso

rapide plialtiĝis. La dua lernojaro same tiel finiĝis kun granda sukceso, sen iu ajn incidento aŭ malbona manifestiĝo. Kompreneble, mi daŭrigis la kontaktojn kun la gepatroj de miaj lernantoj, kaj tio tre bonefike kontribuis al la instruado.

En la tria klaso tamen mi rimarkis, ke unu el miaj lernantoj, Vanju Petrov, komencis postresti de siaj samklasanoj. Ofte li venis sen hejmaj ekzercoj aŭ nepreparitaj lecionoj. Iom post iom li komencis eviti siajn kunlernantojn. Tio tre mirigis min kaj foje mi direktiĝis al lia hejmo. Tie mi eksciis, ke en la somero lia patrino estis mortinta. Tiu ĉi evento treege ĉagrenis la knabon, ĉar li amegis sian patrinon, kaj ŝia morto terure skuis lian animon. Lia fratineto, iom pli aĝa, amoplene zorgis pri li, tamen, malgraŭ ĉio, ŝi ne povis forigi lian profundan melankolion. Mi interparolis ankaŭ kun lia patro — saĝa, komprenigema kaj sincera homo. Profesie li estis fruktokulturisto kaj preskaŭ tutan tagon pasigis en sia fruktĝardeno. La patro plendis antaŭ mi, ke mankas al li tempo por zorgi iom pli pri siaj infanoj. Dum lia edzino estis viva, ŝi okupis sin pri ili, kaj nun tiun taskon li komisiis al sia ankoraŭ tre juna filino.

Do, mi devis serĉi eliron el tiu ĉi malagrabla situacio. Iun tagon, dum la foresto de Vanju Petrov, mi komencis interparolon kun miaj gelernantoj, al kiuj ankaŭ faris impreson lia stranga konduto. Ni decidis helpi lin. Ĉiuj komencis manifesti al li pli grandan atenton, zorgeme helpis lin prepari bone la lecionojn.

Por forigi la melankolion de la knabo mi donis al li taskon prepari hejme verkon pri la laboro de sia patro en la fruktĝardeno. Mi devigis lin nepre konsulti la patron pri ĉio. La sekvan semajnon Vanju prezentis al mi mo-



delan verkon. Post mia korekto li reskribis la verkon, kaj mi sendis ĝin al la redakcio de iu porinfana revuo, kiun preskaŭ ĉiuj infanoj de mia klaso ricevadis kiel abonantoj. La redakcio estis anoncinta, ke ĝi premios la plej bonan verkon de lernanto.

Post unu monato ni eksciis, ke la verko de Vanju estis la plej bona inter ĉiuj prezentitaj, pro kio li ricevis la unuan premion — la romanon de Ĝek London (Jack London) „La Blanka Dento“.

Mi petis la direktoron de nia lernejo enmanigi la premion al Vanju Petrov en la ĉeesto de ĉiuj gelernantoj el la lernejo, dirante samtempe kelkajn konvenajn vortojn por impulsi ĉiujn.

Al mia Vanju kvazaŭ elkreskis flugiloj. Li rapide estiĝis plej bona lernanto ne nur en mia klaso, sed ankaŭ en la tuta lernejo. Ĉio ĉi rezultigis emon al konkurado ĉe ĉiuj gelernantoj en la lernejo.

La sekvan lernojaron, en la kvara klaso, Vanju denove estis plej bona. Kaj plej bona ankaŭ en la studrondo de Esperanto, kiun mi ekgvidis. Li la unua komencis korespondi kun alilandaj esperantistoj. La leterojn, kiujn li ricevadis el fremdlando, ni voĉlegis en la klaso. Kortuŝajn momentojn mi travivis tiam. Ankaŭ nun, kiam mi rememoras ĉion ĉi, miaj okuloj nevole humidiĝas.

Rakontante tion, mia amiko direktiĝis al iu foto sur la muro — ĝi prezentis lian studrondon de Esperanto dum tiu jaro — kaj montris sian lernanton Vanju sur ĝi. Mi ankaŭ leviĝis kaj trarigardis la foton. Poste Stefan daŭrigis sian rakonton.

— La patro de Vanju multe ĝojis pro la granda ŝanĝo de sia filo kaj ankaŭ pro lia sukceso en la lernejo. Kaj iun tagon mi estis tre agrable surprizita: li alportis al mi donace junan cidoniarbon kaj donis al mi konsilojn, kie planti kaj kiamaniere flegi ĝin. Mi komencis zorgi pri tiu arbeto, same kiel mi zorgis pri Vanju, kaj mia koro ĝojis, dum mi observis

kiel ili ambaŭ plifortikiĝas — Vanju kun sia ĉiam pli bona sukceso en la lernejo, kaj la juna arbeto — kun sia jam bone disvolviĝinta branĉokrono.

Mia surprizo kaj ĝojo ne havis finon, kiam la sekvan printempon la arbeto estis ornamita per rozkoloraj floretoj, kaj dum la aŭtuno sur ĝiaj branĉetoj aperis kelkaj grandaj orkoloraj fruktoj.

En la fino de la lernojaro ni disiĝis kun Vanju — li devis esti lernanto en la progimnazio. Ankaŭ tie li estis superulo.

Mia cidoniarbo ĉiam pli kaj pli kreskis kaj plifortikiĝis. Kaj ĉiujare ĝi ornamigis per orkoloraj fruktoj.

Sed kio okazis plue al mia Vanju, eble vi demandos.

Vanju ne ĉesis esti superulo ĉiujare kaj finis ankaŭ la gimnazion kun perfekta sukceso. Tiu tempe lia fratino edziniĝis kaj ekloĝis en alia urbo. Tien iris ankaŭ la patro.

Tiel mi por longa tempo perdis la kontaktojn kun ili.

Foje mi devis veturi al Varna per la vagonaro. Serĉante sidlokon mi malfermis la pordon de iu kupeo. Ankaŭ tie ne estis libera loko, sed bone edukita juna homo tuj cedis al mi la sian. En la unua momento lian vizagon mi ne atentis, sed sur la refaldo de lia jako mi tuj rimarkis la ride-tantan verdan steleton. Kompreneble, mi ankaŭ portis la mian. Ni tuj ekrigardis kun intereso unu la alian. Kia surprizo! Antaŭ mi staris mia amata Vanju! Li ankaŭ tuj rekonis min, forte ĉirkaŭbrakis kaj kisis min, dirante emociite: „Mia karega instruisto, kia ĝojo por mi vidi vin! Mi tiom multe, multege ŝuldas al vi!“ Tiujn vortojn ankoraŭ nun sonas agrable en miaj oreloj kaj mi neniam povas forgesi ilin.

La vagonaro jam proksimiĝis al la stacio, kie Vanju devis elvagoniĝi. Sed li ne deziris, li ne povis tiel rapide disiĝi kun mi kaj insiste petis min interrompi mian veturadon kaj esti lia gasto, almenaŭ unu aŭ du tagojn. Mi kun plezuro akceptis la proponon.

Ni elvagoniĝis kaj direktiĝis al la proksima urbo per aŭtobuso.

En la korto de la hejmo de Vanju bonvenigis nin juna ridetanta kaj tre ĝentila virino — lia edzino. Post kiam Vanju prezentis min, la virino diris: „Vanju multfoje parolis al mi pri vi.“ Ŝi estis instruistino de franca lingvo kaj kemio en la loka gimnazio. Kompreneble, Vanju jam sukcesis varbi ŝin al Esperanto. Sur la ŝtuparo aperis iliaj du infanoj — Ljubka kaj Rosen, kiuj ankaŭ tre ĝentile bonvenigis min.

Post nelonge la bildo kompletigis: aperis ankaŭ la patro de Vanju, kiu tiutempe loĝis ĉe sia filino en la sama urbo, kaj Vanju vokis lin gaste per la telefono.

Ĉu necesas priskribi nian renkontiĝon kun la patro de Vanju? Tio estis plej kortuŝa intervidiĝo, ĉar kara sekreto el la pasinteco vivis en niaj koroj.

Kompreneble, mi tuj interesiĝis pri la vivovojo de Vanju post la gimnazio. Mi eksciis, ke li finis la superan instituton pri agronomio kaj jam en daŭro de jardeko estas ĉefagronomo de granda agrikultura laborkooprativo. Ankaŭ ĉi tie Vanju estis plej bona en la tuta distrikto kaj lia kooprativo estis multfoje distingita per diversaj moralaj kaj materialaj premioj. Pro

lia bona laboro oni sendis lin al Sovetunio kaj Nederlando por interŝanĝi spertojn. De tie li kunportis diversajn semojn kaj fruktarbetojn. Vanju korespondis kun esperantistoj el multaj landoj, informante ilin pri la ekonomia, kultura kaj scienc-teknika supreniro de nia lando, pri la batalo de nia popolo kontraŭ la faŝismo kaj nun kontraŭ preparantoj de nova milito — por paco kaj amikeco inter la popoloj. El multaj landoj li ricevadis semojn, drogherbojn ka.

La sekvan tagon ĵus mateniĝis kaj mi ektrovis min en la korto. Mi estis tre agrable surprizita: ĉirkaŭe etendiĝis mirinde bela ĝardeno, kie en aparta bedo estis plantitaj floroj kaj drogherboj el fremdlando, ĉiu el kiuj montris sian vizitkarteton — malgrandan slipon, sur kiu estis skribita ties latina nomo, deveno kaj specialaj kvalitoj. Tiu ĉi bedo portis la nomon: „Internacia renkontiĝo de plantoj“.

Post matenmanĝo ni vizitis la kooperativan agrikulturan mastrumon, kiun Vanju gvidis kiel ĉefagronomo. Ankaŭ ĉi tie antaŭ la kancelario estis bone flegata floriĝardeno.

Stefan haltis. Lia rigardo denove direktiĝis al la orkoloraj cidonioj, kaj li ĝemsopire finparolis:

— Kara donaco, tre kara donaco, kiun per nenio mi interŝanĝus!

ORGANIZA VIVO

Sofio. Grandan tuturban solenaĵon omaĝe al la 117-a naskiĝtago de d-ro L. L. Zamenhof organizis je la 13 de decembro la Distrikta Estraro de BEA. Ĝi okazis en la salono de la Klubo de Kulturagantoj. Partoprenis kelkcentoj da esperantistoj kaj amikoj de Esperanto. Festan paroladon faris k-do Kunĉo Vălev, sekretario de Centra Estraro de BEA kaj ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“. En la altnivela belarta programo partoprenis la artistoj de Bulgara Esperanto-Teatro Belka Beleva, Iskra Radeva, Petro Vuĉkov kaj Todor Jurukov, la konataj operaj geaktoroj-esperantistoj Maria Angelova kaj Veselin Damjanov,

AMASETRA LA LANDO ZAMENHOF-CELEBROJ

la esperantisto kanzonisto Miŝo Zdravev kaj aktoroj-neesperantistoj el la Muzika Teatro.

La tradicia komura vespermanĝo de la ĉefurbaj esperantistoj okazis la 15-an. Partoprenis pli ol cent personoj.

Kr. Karuĉin

Plovdiv. La urba E-societo „Kulturo“ kune kun la Urba Komitato de Patrolanda Fronto kaj la Urba Konsilantaro pri Arto kaj Kulturo organizis la 15-an de decembro kunvenon dediĉe al Zamenhof kaj la 90-jariĝo de Esperanto. En la salono de la popola Armeo venis pli ol 300 personoj. Prelegis prof. d-ro Stojan Ĝuĝev el Sofio, membro de



la Akademio de Esperanto, je temo „Naciaj kulturoj kaj ĉia Internacia Lingvo“. Studentoj de la Supera Muzik-Pedagogia Instituto, kiuj lernas Esperanton, plenumis belartan programon. Je la fino oni projekciis la sovetan filmon kun E-parolo „Mi petas la parolon!“

Al la Zamenhof-tagoj la societo dediĉis ankaŭ du sinsekvajn semajnajn kunvenojn. Atanas Ŝopov prelegis je temo „Esperanto-literaturo originala kaj tradukita“, kaj Ivan Ŝivarov je temo „La poezio de Zamenhof“.

M. Panova, V. Kurteva

Stara Zagora. DE de BEA kaj la loka E-societo „Verda Stelo“ okazigis grandan solenaĵon dediĉe al Zamenhof. Krom loĝantoj de la urbo partoprenis gastoj el la distrikto (la urboj Ĉirpan kaj Gălabovo, la vilaĝoj Kolarovo kaj Bădaŝte), ankaŭ el u. riaskovo. Festparoladon faris Kunĉo Vălev el Sofio, sekretario de CE de BEA. En la belarta programo partoprenis lernantoj-esperantistoj el riaskovo sub la gvido de sia instruistino Maria Veleva, el v. Kolarovo — sub la gvido de la instruistino Roza Dimitrova, el v. Bădaŝte — sub la gvido de la instruistino Ivanka Popova, kaj el Stara Zagora — sub la gvido de la instruistino Jana Terzieva. K. Vălev recitis „La vojon“ de Zamenhof en bulgara kaj en Esperanto.

J. Kolev

Ŝumen. Solenan festvesperon omaĝe al Zamenhof organizis DE de BEA kaj la urba E-societo „Vekiĝo“. Ĉeestis gastoj el la urboj Preslav kaj Kaspican. Prelegis Canko Murgin — instruanto el la Supera Pedagogia Instituto

en la urbo. En la sama kunveno, lĝe kun la Tago de la E-Libro, estrarano de „Vekiĝo“ esprimis publike dankon al k-dino Maria Petkova — bibliotekistino en la urba leĝejo „Progreso“, kiu tre akurate prizorgas la funkciadon de la E-fako en la biblioteko.

Cv. Todorov

Gabrovo. La solena celebrego de la Zamenhof-naskiĝtago okazis en la Domo de la Kulturo. Emocian raporton faris Neno Janev — prezidanto de DE. Aparte li emfazis la rolon de Esperanto en la nuntempa periodo, kiam la spirito kaj la decidoj de Helsinki postulas ĉiam pli aktivan ĉiuflankan interŝanĝon inter la popoloj. Amatora kantgrupo el la kurso de Djanko Minĉev plenumis naciajn kantojn en Esperanto, kaj la kursgvidanto mem sen-toplene recitis „La vojon“ de Zamenhof.

La vespero finiĝis per komuna vespermanĝo.

G. Radkinov

Blagoevgrad. DE de BEA, la estraro de la loka E-societo „Espero“ kaj la Junulara Kulturdomo organizis celebregon de Zamenhof ĝuste la 15-an de decembro.

La solenaĵo komenciĝis per belarta programo, prezentita de la plej junaj esperantistoj el III fundamenta lernejo. Raporton faris Angelina Ivanova — sekretariino de la societo.

Estis interŝanĝitaj spertoj kun la „unaj“ esperantistoj el Vraca, Smoljan, Karlovo, post kio oni fondis Klubon de Junpioniroj kaj Mezelernjanoj-Esperantistoj.

M. Vakaŝinska

FESTO DE LA ESPERANTA LIBRO

E-societo „Roza Valo“ en u. Kazanlâk organizis en decembro feston de la Esperanta libro. En la salono kolektiĝis pli ol 100 personoj, inter kiuj gastoj el Stara Zagora, Măglij, Plovdiv, Haskovo, Gabrovo, Sofio.

Por prelegi pri la temo „La Esperanto-literaturo“ estis invitita la konata bulgara E-poeto Asen Grigorov. Pro malbona sanstato li ne povis partopreni persone. Lian riĉenhavan kaj emocian prelegon tralegis Rajna Arnau-dova.

La artistino Veselina Kurteva el Plovdiv recitis versaĵojn de Asen Grigorov, Toma Ajolov kaj Stefka Maĉeva. D-ro Nikola Kisjov el Kazanlâk recitis propran poemon dediĉe al la aŭtoro de Esperanto kaj donacis al societo „Roza Valo“ belartan platon kun bareliefo de Zamenhof. Proprajn poeziaĵojn legis ankaŭ d-ro Stefan Kadiev el Sofio. Petro Edrev el Gabrovo recitis sian tradukon de la poemo „Ŝipka“ de Ivan Vazov.

La operartistino Rene Jodranova el Stara Zagora plezurigis la publikon per kelkaj esperantlingve tradukitaj bulgaraj popolkantoj. Agrabla surprizo estis ankaŭ la bela esperantlingva kantprogramo de ensemblo el ler-

nantina E-kurso de la instruistino Maria Veleva el Haskovo. Partoprenis ankaŭ ensemblo el lernejo „Hr.Smirnenski“—Kazanlâk.

Estis aranĝita ekspozicio el E-libroj kaj el la fotoj de 90 E-poetoj, publi-istoj kaj artistoj.

Kr. Karucin

DISTINGITA ESPERANTISTO

Okaze de la Tago de Studento (la 8-a de decembro) la Centra Konsilio de la Sindikatoj kaj la Centra Komitato distingis per la medalo „Superulo de la Sesa Jarkvino“ lektorojn en la Supera Pedagogia Instituto en urbo Ŝumen pro ilia modela instrua kaj socia agado. Inter la distingitoj estas ankaŭ Canko Murgin, regula instruanto en la instituto kaj gvidanto de la fakultativa instruado de Esperanto tie, membro de CE de BEA.

Dum la tagoj de la studenta festo en la rektorejo estis aranĝita ekspozicio de libroj, verkitaĵoj de la institutaj instruantoj. De Canko Murgin estis eksponitaj 18 libroj, parto el kiuj en Esperanto (originalaj kaj tradukitaj). La esperantlingvaj libroj vekis grandan intereson inter la studentoj. Sekvis multaj aliĝoj al la studgrupoj de la Internacia Lingvo.

Je la 29-a de decembro 1976 la sofia esperantistaro solene celebris la 70-jariĝon de Georgi Dolapčiev. Raporton pri lia vivo kaj agado faris Krăstju Karucin — organiza sekretario de BEA.

La saluta creson de CE de EEA al la jubileulo tralegis la prezidanto Ĥristo Gorov, kiu enmanigis al li memordnace horloĝon. Dekoj da reprezentantoj de sofiaj E-organizoj ankaŭ gratulis Dolapčiev kaj prezentis multajn donacojn kaj bondezirojn pri ankoraŭ longa vivo kaj fruktodona agado.



VIVO KAJ AGADO DE G. DOLAPČIEV

Por homoj, kiuj limigis sin en la kadro de sia familio kaj ne esprimas aktivecon al agado pli vasta, utila por la socio, la alta cifero de la jaraĝo elvokas triston, malesperon. Sed por personoj, kiuj dediĉis sian vivon je servo de la socio, tiu cifero estas nur motivo ĵeti rigardon returnen, por rememorigi ĉion utilan, ĝis nun faritan kaj ĉerpi novan inspiron por sekvi la vojon elektitan.

Nia jubileulo estas inter ĉi lastaj personoj. Li povas ĝoji pri sia 70-jariĝo, vidante, ke lia vivo ne estis vana. Ni, kiuj kunvenis ĉi-vespere, ĝojas kun li, esprimante altan rekonon de lia abnegacia laboro sur la E-kampo.

Georgi Dolapčiev naskiĝis la 26-an de oktobro 1906 j. en urbo Malko Târnovo en familio kun 9 gefiloj. Lia patro prigajnis la vivrimedojn de la multnombra familio per peza laboro kiel luanto de akvomulejo. Georgi jam 7—8-jara komencis helpi sian patron. En 1920 jaro la familio translokiĝis al Varna. Tie la patro plenumis kian ajn laboron. Georgi jam estis 14-jara. Li eniris la komercan gimnazion, sed ĉiun ferion devis labori ĉu en tabakfabriko, ĉu en la haveno aŭ aliloke. Tuj post la gimnazio li fariĝis oficisto en la komunumo de Varna. Tamen la gimnazia klereco ne sufiĉis al li kaj li ekstudis foreste en la Libera Universitato en la fakoj financoj kaj administrado.

Ekde 1936 j. G. Dolapčiev ekloĝis en Sofio.

Jam junulo li akceptis la ideojn de la revolucia laborista movado kaj aktive laboris en la Komsomolo. Aparte notinda estas lia aktiveco en la junulara abstinenta kaj E-movadoj. Dum la periodo de la kontraŭfaŝisma batalo li liveris al la partizanoj nutraĵojn, vestojn, medikamentojn.

Post la popola venko je la 9-a de septembro 1944 li laboris tre aktive en diversaj amasorganizaĵoj, aparte en la Patrolanda Fronto. Pro lia fruktodona socipolitika agado kaj batalo la popola registaro distingis lin per la alta kulturordeno „Kiril kaj Metodi“ — unua grado.

La Internacian Lingvon Georgi Dolapčiev ellernis kiel gimnaziano en 1921 j. en kurso de la konata E-pionirino Zora Mladenova Hans. Nia jubileulo rapide progresis en la lingvo kaj aliĝis al la loka E-societo „Fratéco“. La membroj esprimis al li fidon kaj elektis lin kasis.o. Baldaŭ li fariĝis sekretario de la societo. Oni ŝatis lian energion kaj entuziasmon, liajn konsilojn. Laŭ lia propono oni ŝanĝis la nomon de la societo al „Albatro“.

Rezulte de lia aktiveco, ankaŭ de la aktiveco de Georgi Dimov, Miĥail Ŝekerĝiev ka., en Varna estis fondita la lernejana E-societo „Verda Lumturo“. Ties prezidanto fariĝis Dolapčiev. La societo rapide progresis, al ĝi aliĝis ne nur lernantoj, sed ankaŭ studentoj el la tiama Komerca Akademio en Varna. En tiu periodo Georgi Dolapčiev gvidis multajn E-kursojn ne nur por lernantoj, sed ankaŭ por civitanoj.

La viglado de „Verda Lumturo“ forte influis kaj diversloke en la lando komencis fondiĝi lernejanaj E-societoj. Tio instigis la gvidantojn de „Verda Lumturo“ iniciati ion pli grandan, landskalan. Enkadre de la 13-a kongreso de la bulgaraj esperantistoj en Varna ili kunvokis fandan kongreson de Gelernanta Esperantista Ligo. Dolapčiev estis elektita sekretario.

Dolapčiev fariĝis animo de la Junulara Ligo. Regule li kontaktis kun lokaj societoj de lernantoj kaj kun unuopaj lernantoj aŭ studentoj-esperantistoj, iniciatis regionajn konferencojn en Veliko Târnovo (1926), en Sliven (1927). Li estis unu el la redaktoroj de „Esperantska Mladeŝ“ (Esperanto-Junularo), organo de la Ligo, aperanta monate en bulgara kaj Esperanto. Ĝi estiĝis tribuno de progresemaj ideoj. Sed la gufo ne toleras lumon. Post tri jaroj la faŝista registaro malpermesis la Ligon



La 3-an de decembro 1976 DE de BEA en Varna, la loka filio de Asocio de Sciencaj Laboristoj kaj la Klubo de Kulturagantoj organizis celebren de docento Georgi Dimov okaze de lia 70-jariĝo.



Raporton pri la vivo kaj E-agado de la jubileulo faris la sekretario de DE de BEA en Varna — D. Dimov.

En la nomo de CE de BEA la jubileulon salutis Violin Oljanov kaj donacis al li memore horloĝon. Kortuŝaj estis la salutvortoj de Kina Haĝieva — prezidantino de DK de la virinoj kaj sekretario de DK de Patrolanda Fronto en Varna. Sekvis salutoj de la sciencaj laboristoj — doc. Ilija Patev, de la Distrikta Packomitato — doc. Belčo Nikolov, merita aganto de la kulturo, eksrektoro de la Supera Instituto de Nacia Ekonomio (VINS) «D. Blagoev», de Kultura Societo «Trakija», kie G. Dimov gvidis la unuan E-kurson en 1936. Versforme prezentis la salutojn de la ĵurnalistoj Pĉelinski. Salutojn prezentis ankaŭ reprezentantoj de la malnova E-societo «Albatroso» kaj de la plej junaj E-societoj «Fajrero» ĉe la Distrikta Popola Soveto, «Printempo» — ĉe la Asekura Instituto, «Studenta Amikeco» — ĉe VINS, «Verda Torĉo» — ĉe la Supera Maŝinelektra Instituto ka. Kortuŝe parolis s-ino Zora Mladenova Hans, kiu en 1921 j. instruis Esperanton al la jubileulo. Ŝi deklaris, ke ŝi fieras pri siaj du Esperantofiloj Georgo-j Dimov kaj Dolapĉiev.

Emociita, G. Dimov esprimis sian koran dankon al la Bulgara Registaro, al CE de BEA kaj al ĉiuj, kiuj salutis lin. Li konfesis, ke li ne povas imagi sian vivon sen sindona laboro por kaj per Esperanto — la lingvo de paco kaj amikeco inter la popoloj en la tuta mondo.

kaj ĝian organon.

La E-agado de Dolapĉiev en Varna daŭris ĝis 1926 j., kiam li translokiĝis en Sofion. Tie li aliĝis al la sofia esperantistaro. Tuj post la starigo de la popola potenco li ekagis aparte aktive. Kiel sekretario de LKK de la 28-a kongreso de la bulgaraj esperantistoj en septembro 1945 li en kunlaboro kun deko da aktivuloj — Asen Grigorov, prof. Stojan Ĝuĝev, Minko Conkovski, Vitali Julzari, Evstati Cifudov, Rajna Konstantinova ka., kontribuis multe por la bona sukceso de la kongreso. Post tio li elektiĝis kiel prezidanto de la ĉefurba E-societo „Maksim Gorkij“. Li ankaŭ estis inter la fondintoj de la Bulgara Esperantista Kooperativo, poste membro de ĝia estraro kaj gvidanto de ĝia presejo.

En 1956 la 32-a E-kongreso en Sofio elektis lin prezidanto de BEA. Kiel tia li faris la necesajn raŝojn kaj la Bulgara Esperantista Asocio aliĝis al UEA. Multjare li estis ties komitatano A.

Kvar jarojn (1956—1960) Dolapĉiev estis prezidanto de BEA. Li donis gravan kontribuon por la stabiligo kaj kreskigo de la organizado.

Li estis iniciatinto de la kampanjo por kolektado de mono por konstruo de propra E-domo per disvendo de specialaj markoj-„brikoj“.

Multajn klopodojn li dediĉis al tiu afero. Rezulte oni kolektis pli ol 8000 levojn por la fonduso „Propra E-domo en Sofio“.

Alia grava lia kontribuo estas la ĉiusemajnaj esperantlingvaj elsendoj de Radio-Sofio ekde 1957 j. Li estis la tradukanto-parolanto de tiuj disaŭdigoj en daŭro de 18 jaroj.

Merito de Dolapĉiev estas ankaŭ la bonaj rilatoj, kiujn li kreis inter la fervojista sekcio de BEA kaj la Internacia Federacio de Esperantistoj-Fervojistoj (IFEF), kies komitatano li longtempe estis. Havante la konsenton de CK de BEA li invitis la kongreson de tiu organizaĵo en Varna por 1968. Li mem fariĝis prezidanto de LKK. Sub lia gvido la bulgaraj fervojistoj-esperantistoj organizis vere sukcesan kongreson. La tiama ministro de la fervojoj akceptis multnombrian diversnacion delegitaron, kio forte impresis la kongresanojn.

Jam sesan jaron Georgi Dolapĉiev estas prezidanto de la Sofia Distrikta-Urba Estraro de BEA. Lian sindonan kaj fruktorican agadon sur tiu posteno ni ĉiuj bone konas.

La vivovojo de nia kara jubileulo Dolapĉiev estas imitinda ekzemplo por la pli junaj E-generacioj. Havante tiajn abnegaciajn agantojn la E-movado en Bulgario marŝas firme al novaj sukcesoj.

Nin kunvenigis al tiu ĉi jubilea solenaĵo feliĉa evento en la vivo de Georgi Dimov — la ĵus kompletigitaj 70 jaroj de lia vivo. Nin kunvenigis la amo al li kaj nia dankemo pro tio, kion li ĝis nun faris por la disvastigo de nia kara Esperanto. Al la Internacia Lingvo G. Dimov dediĉis fidele kaj sindone pli ol 55 jarojn.

Li estas naskita la 29-an de oktobro 1906 en Varna en la familio de fuĝintoj el Trakio. Unuafoje li aŭdis pri Esperanto en 1921, kiam li estis 15-jara lernanto en la Komerca Gimnazio. En Varna tiam ekzistis E-societo „Fratego“, kiu en 1925 j. alinomiĝis „Albatro“ kaj nun „Albatroso“. En 1921 j. la societo malfermis kurson gvidatan de Zora Mladenova Hans. La lecionoj okazis vespere en la Knaba Gimnazio. Inter la gekursanoj estis ankaŭ du Georgoj — nia jubileulo Georgi Dimov kaj Georgi Dolapĉiev — la nuna prezidanto de DE de BEA en Sofio. Malnovaj esperantistoj ofte vizitis la kurson, inter ili Dimitro Zlatarski — Miti, E-poeto, Georgi Sapunĝiev — Sapo, Ivan Dimĉev — Hanso (kju poste edziĝis al Zora Mladenova), Miĥail Miĉev, Vasil Baĉvarov — la Barelego ka.

En 1925 Dimov finis la Komercean Gimnazion, en 1932 j. — la tiaman Superan Komercean Lernejon en Varna.

En 1935 en Varna ekgvidis kurson Todor Stojanov — la t. n. „La Estono“, ĉar lia edzino estis estonino (esperantistino). La kurso estis gvidata laŭ la rekta metodo de Andreo Ĉe. Tiu ĉi metodo plaĉis al nia jubileulo kaj la sekvan jaron li ekgvidis laŭ ĝi E-kurson por komencantoj en la Trakia Domo. La rezulto estis miriga: el 43 gekursanoj ĉe la komenco, 38 atingis la finon kaj estiĝis entuziasmaj esperantistoj malgraŭ la persekutoj de la faŝista polico. La sukceso de tiu ĉi unua kurso montris al Dimov la vojon al la pedagogia kampo.

En 1936/37 G. Dimov kiel kandidat-instruisto lernoservis en Komerca Gimnazio en Sofio (kv. Lozenec). En la Esperanto-Domo sur str. „Alabin“ 50 li gvidis same sukcese kurson por civitanoj.

Sendube, tiuj sukcesoj fariĝis decidaj por Dimov kiel esperantisto kaj lektoro de Esperanto. Sed ankaŭ alia evento en lia vivo ludis gravan rolon. Okazis tiel, ke la savinto de lia morte malsana frato, tiam la 14-jara Totko (nun la tre konata kuracisto-laringologo d-ro Todor Dimov), estis d-ro Mieczyslaw Zamenhof — nevo de nia majstro d-ro L. L. Zamenhof. Li hazarde troviĝis en Varna (dum aŭgusto 1936). Neniam G. Dimov povas forgesi,

ke tiu ĉi tute nekonata homo savis la vivon de lia amata frateto. Kaj tiu homo estis esperantisto! Nenio povis deflankigi G. Dimov de la jam elektita vojo — nek la bomvoj, ĵetitaj dufoje de faŝistoj en la E-klubejon sur str. „27-a de julio“, nek la nigra nebulo de la Dua Mondmilito, kiun la faŝistoj febre preparis, nek la minaco per persekutado al la progresemaj homoj, kiaj ja estis la esperantistoj.

Ekde 1938 j. Dimov laboris kiel instruisto en la Komerca Gimnazio en Varna kaj ekde 1946 j. — kiel asistento pri librotenado en la Supera Instituto de Nacia Ekonomio (VINS) en Varna.

Se la laboro por Esperanto estis la intima vivo de G. Dimov, lia oficiala vivo estis dediĉita al la scienco. Li tamen ofte sukcesis kunigi Esperanton kun la bezonoj de la scienco. Ekzemple en 1938 j. li entreprenis internacian enketon pri la komercaj lernejoj en la diversaj landoj. Dank' al lia E-laboro kaj la helpo de doc. Gančo Radev, tiam a vicrektoro de VINS „D. Blagoev“, Esperanto estis oficiale enkondukita en la Institucion kiel fakultativa lernobjekto.

Trairinte longan vojon G. Dimov estiĝis lerta instruanto de Esperanto kun internacia rekono. Oni invitis lin prelegi, gvidi kursojn, ĉeesti kongresojn kaj konferencojn en multaj landoj. Lia ĉeesto ĉiam postlasis signojn.

Aparte notinda estas lia instrulaboro. G. Dimov gvidis multnombrajn E-kursojn, ĉiam kun granda sukceso. Lia instruado distingiĝas per dinamiko kaj artismo. En liaj lecionoj ĉiam regas vigleco kaj gaja humoro.

Georgi Dimov estas aŭtoro de lernolibroj de Esperanto, kunaŭtoro de E-vortaroj, verkinto de artikoloj pri Esperanto kaj la E-movado. Ni ne povas preterlasi ankaŭ la fakton, ke li estas aŭtoro de dekoj da fakaj artikoloj, de libroj kaj lernolibroj por studentoj.

La E-movado en Varna kaj ĝia distrikto estas nedisigeble ligita kun la nomo de nia jubileulo — docento Georgi Dimov. Li ĉiam okupis gvidpostenojn en la urba E-societo „Albatroso“, en DE de BEA en Varna. De multaj jaroj li estas membro de CE de BEA, delegito de UEA, honora membro de la esperantistaro de Leipzig (GDR). Kiel esperantisto li estas por la junaj generacioj ekzemplo de fidela servo al la alihumana ideo de Esperanto. La esperantistoj bone scias, ke nia jubileulo plej diligente laboris sur la kampo de la scienco, sed lia vera, unua kaj lasta amo restas Esperanto.

La Ŝtata Soveto de Popola Respubliko Bulgario honoris doc. Georgi Dimov el Varna per ordeno „Kiril kaj Metodi“ — I grado, lige kun lia 70-jariĝo, pro lia multjara laboro sur la kampo de la ekonomiaj sciencoj kaj pro lia sociagado.



Bonan iniciaton ekhavis la rondo de la Literatura Sekcio en Sofio: aranĝi vesperojn dediĉe al niaj E-verkistoj. Tiamaniere la esperantistoj povas ĝui la verkaron de siaj E-poetoj kaj prozistoj, vidi ilin persone inter si, fieri pri ili kaj ilia verkaro.



La unua el la serio de similaj literaturaj vesperoj estis dediĉita al unu el niaj plej elstaraj nuntempaj E-poetoj — Asen Grigorov.

Literaturan portreton de la poeto faris Kunĉo Vălev. Per emociaj vortoj li priskribis la riĉan revolucionan verkaron de Grigorov, en kiu dominas la socialaj motivoj, profunda amo al la laborhomoj kaj forta malamo al iliaj subpremantoj kaj ekspluatantoj. Tondre sonis la voĉo de la poeto kaj alvokis al batalo kontraŭ la malnova mondo de sociaj maljustoj, mizero kaj suferoj. Lia idéo estis la socialismo.

En sia verkaro post la tago de la liberigo — la 9-a de septembro 1944 — Grigorov pri-kantas la konstruadon de nova vivo en nia libera patrolando, la vivokrean bulgara-sovetan amikecon, la pacon sur la tero, la amikecon inter la popoloj.

Apartan lokon en la poezio de Grigorov okupas la Esperantaj motivoj. Kun profunda amo li parolas pri la granda humanisto Zamenhof, pri la nobla laboro de la esperantistoj kiel patriotoj, interraciistoj kaj pacbatalantoj.

Siajn asertojn pri apartaj flaroloj de Grigorov-verkaro la preleganto argumentis per riĉaj citaĵoj el ĝiaj diversaj periodoj. Li notis ankaŭ la riĉegan tradukan verkaron de la poeto. Grigorov majstre tradukis faj de klasikuloj, kaj de nuntempaj bulgaraj poetoj. Li multe kontribuis por la nacia literatura al la ekstera mondo pere de Esperanto.

Resumante la preleganto konkludis, ke Asen Grigorov okupas per ĉiam elstaran lokon en la bulgara Esperanto-literaturo.

Post la prelego de Kunĉo Vălev skvis riĉa programo el la origina la traduka verkaro de Grigorov. Recitaĵojn faris Vera Văjarova, Morjana Văleva, Rajna Arnaudova, Cvetanka Abdulska, Miĥail Ĉobanov, Ginka Dilova, Miŝo Zdravev, Belka Beleva, Ĵorĵeta Zdraveva, Cvetanka Ruseva, Mariana Elenova, Georgi Miĥalkov, Kunĉo Vălev. Kantojn tradukitajn de Asen Grigorov plenumis Maria Angelova. La recitaĵoj estis akompanataj de konvena muziko. La tutan vesperon regisoris Miŝo Zdravev.

Fine sur la scenejon estis elvokita la ĉeestanta poeto mem. Li kortuŝite dankis pro la estimo, esprimita al li, kaj pro la alta pritakso de lia poezio.

Tio estis vespero kun riĉa idea-eduka, estetika kaj lingva influo. Por ĉiuj ĉeestantoj ĝi restos neforgesebla.

KV

La 26-an de oktobro 1976 en Vraca forpasis je honorinda 88-jara aĝo la plej maljuna veterano de la loka E-movado

Ceno Icov Partov

Esperanton li lernis en 1904, kiam en Vraca estis gimnazio la elstara bulgara esperantisto Ivan Krestarov — la unua semanto de Esperanto en tiu urbo. Notinde estas, ke Ceno Partov partoprenis la Universalan Kongreson de Esperanto en 1913 en Krakovo (Pollando), persone konatiĝis kun d-ro Zamenhof kaj parolis kun li.

Dum sia tuta vivo Ceno Partov honeste laboris por Esperanto, per ĵaco kaj amikco inter la popoloj.

En Sofio la 7-an de decembro forpasis

Dimitro Dojĉev Veleŭ

veterano de la E-movado en nia lando, aktivulo de la laborista E-movado, membro de CE de BEA, multjara prezidanto de la Bulgara E-Kooperativo.

La 5-an de januaro forpasis 65-jara

Nejko Manev

naskita en v. Lovĉ, distrikto de Stara Zagora, multjara prezidanto de la E-societo en u. Drjanovo.

Hr. Marinov

VOLONTULO DE LA LIBERO

Hispanio! Lando de verdaj olivarboj kaj nudaj montaroj. En via sino kuŝas la ostoj de volontuloj de la libero el kvindek kvar nacioj. Ili falis antaŭ la muroj de Madrido kaj Gvadalahara, de Teruel kaj Belçite, ĉe la riveroj Harama kaj Ebro.

Sub la sablo de Harama kuŝas la ostoj de la bulgara esperantisto Kosta Penev, pereinta en februaro 1937.

... La 21-an de februaro la respublika armeo devis entrepreni ofensivon por forpeli la malamikon el la urbeto La Maranosa, okcidente de Harama. Por la ofensivo sin preparis kelkaj hispanaj brigadoj kaj la internaciaj brigadoj 11-a kaj 12-a, konsistantaj el volontuloj el Anglio, Usono, Francio, Italio, Germanio, Pollando, balkanaj landoj. Al la 12-a brigado apartenis ankaŭ la bulgara roto.

La vetero tiumatene estis frosta. Glacia vento razis la herbon. Malgraŭ tio la entuziasmo pri la ofensivo estis granda. El la tranĉeo de la germanaj volontuloj sonis kanto:

Hispana ĉiel' stelojn sternas
super nia remparo,
el' orient' salutas nin mateno
baldaŭ eniros ni novan batalon,
Malproksimas patroland',
tamen pretas ni kun kant'
militi kaj venki por vi,
ho liber'!

La ofensivo komenciĝis je la 10-a horo. Hispanoj kaj internaciistoj sturmis impete la faŝistojn sub ŝirmo de tankoj kaj kanonoj. Post la remparo ĉe unu kanono staris juna bulgaro kaj tondre komandis:

— Fajron! Fajron!

Komandis la kanonestro Kosta Penev.

Kiam ĉe krepusko la batalo ĉesis, mem generalo Lukaŝ, la komandanto de la 12-a internacia brigado, laŭdis lin pro lia sperteco de artileriisto.

Ĉiuj soldatoj de la Respubliko estis kontentaj tiutage, ĉar la ofensivo estis sukcesa.

Forkonsuminte la „kanongulaŝon“, la hispanoj ekkantis popolan melodion:

Kvar generaloj,
kvar generaloj,
sinjoroj generaloj,
mamita mia¹,
nin do perfidis,
nin do perfidis.
Madrid, urbo ĉarma,
mamita mia,
vin volas venki ili.

Pro viaj sangaj larmoj,
mamita mia,
ni venĝos terure.
Kaj nian sklavan staton,
mamita mia,
ni nepre forĵetos.

La 22-an de februaro denove glacia vento vipis senkompate la vizaĝojn de la soldatoj. Kosta Penev ekstaris post la remparo kaj ordonis al siaj soldatoj kanoni. Per trafaj pafoj ili detruis malamikajn fortikaĵojn, postenojn de observado, ŝirmejojn de maŝinpafiloj. Neatendite el la kontraŭa flanko siblis ŝrapnelo kaj eksplodis proksime al Kosta. Ferpeco disŝiris la bruston de la kanonestro. La saman tagon li mortis en la lazareto. . .

— — — — —
Dek jarojn antaŭe, en 1927, Kosta Penev, metilernanto ĉe tajloro, lernis Esperanton en Asenovgrad kaj komencis interŝanĝi korespondaĵojn kun esperantistoj el diversaj landoj. Tiel lia horizonto forlasis la limojn de la patrolando.

Lia patro, malriĉa kamparano, revis vidi lin moda tajloro, sed la junulo ekiris alian vojon. Li legis librojn pri kolektivismo kaj komunismo, partoprenis la fondon de laborista junula societo en Asenovgrad. Je la unua de majo 1928 j. Kosta partoprenis manifestacion, ĉe kiu la junuloj kunpuŝiĝis kun la polico. Dum la interpuŝiĝo li pugnobatis policanon kaj pro tio devis forlasi la urbon por eviti areston.

¹ Panjo mia.



En Plovdiv li dungis sin ĉe tajloro, kiu apartenis al la estraro de la metiŝta unuiĝo. En ĝia domo la laboristoj-esperantistoj kunvenis ĉiusemajne kaj perfektigadis sin en la lingvo. Kosta regule vizitis la kunvenojn kaj trovis novajn amikojn.

Dum la vintro de 1930 j. Kosta estis senlabora kaj partoprenis demonstracion de senlaboruloj. Per akraj vortoj li mallaŭdis la kapitalisman sociordon, pro kio altiris sur sin la atenton de la polico. Por sin savi de siaj persekutantoj li translokiĝis en Sofion, kie dediĉis sin al komsomola agado.

En marto 1932 Kosta fariĝis rekruto en la artileria regimento en urbo Smoljan. En la kazerno li amikiĝis kun la RMS-anoj² Metaksa Guginski kaj Kosta Avramikov. La triopo diligente servis kaj distingigis per la akiritaj militkonoj. La regimentestro rekomendis la triopon por la suboficira lernejo en Pazarĝik. Tie Kosta kontaktis kun kamarado, kiu liveris al li kontraŭfaŝistajn gazetojn kaj flugfoliojn. En unu el la flugfolioj la soldatoj legis: „Kamaradoj soldatoj, kiam la burĝa registaro direktos vin al milito kontraŭ la nepoj de niaj liberigintoj el osmana jugo, ne pafu kontraŭ la rusoj. Interfratiĝu kun la ruĝarmeanoj!“

Tio sufiĉis, per ke oni mortpafu la disvastiganton de la flugfolio.

Oficiro esploristo ekflaris la aferon kaj provis aresti la triopon. Sed ĝustatempe avertitaj, ili eskapis el la kazerno.

Kelkajn semajnojn Kosta kaŝis sin ĉe kamarado en Rodopi-montaro kaj poste sukcesis transiri la landlimon kaj atingi Sovetion. Tie li studis en la Komunista Universitato. En septembro 1936 li tralegis en „Pravda“: „Junuloj el la tuta mondo, aŭskultu! Ni parolas je la nomo de la tuta hispana junularo. Nin atakis faŝistoj. Ni kontraŭstaras kaj nin defendas. Ni atendas vian solidarecon!“

Kosta senhezite decidis: al Madrido!

En oktobro tra Francio li transiris la hispanan limon. En urbo Albasete oni registris lin en la internacian brigadon. Kun kantoj la volontuloj forveturis al Madrido kaj repuŝis la puĉistojn, kiuj minacis la ĉefurbon de la Respubliko.

Kiel kanonisto Kosta batalis ĉe la universitata kvartalo, poste ĉe Harama, kie ĉesigis lian vivon la faŝista ŝrapnelo. . .

Kvardek jaroj pasis de la batalo ĉe Harama. Nuntempe la hispana popolo denove levis sian voĉon, postulas liberon kaj demokration.

Neforgeseblaj restas la vortoj de Dolores Ibaruri, diritaj antaŭ 39 jaroj pri la heroaĵo de la kunbatalantaj internaciistoj: „Vi donis al ni ĉion — vian junecon kaj maturecon, viajn sciojn kaj spertojn, viajn sangon kaj vivon, viajn esperojn kaj revojn. Vi donis ĉion kaj postulis nenion. Vi volis nur la honoron morti por nia libero.“

² RMS-Laborista Junkomunista Unuiĝo.

INTERNACIA RENKONTIĜO NATURAMIKA (IREN)

Hungario, Abaliget — Pécs, 10—19 de julio 1977

Kore ni invitas vin refreŝigi kaj ĝui agrablan internacian E-rondon en carma arbara ripozloko de la montaro Meĉek (Mecsek). La kampadejo kontentigas ĉies pretendon. Komfortaj dometoj kun banĉambroj estas je via dispono.

Riĉa programo el ekskursoj en bela regiono, lingvoperfektigado, gajaĵvesperoj, tendarfajro, distraj konkursoj, folkloro plezurigos vin dum ĉi-jara jubilea 10-a renkontiĝo.

Kotizoj laŭ kategorio de la tranoktejo:

a) 1700 forintoj, b) 1500 ft c) 1300 ft, d) 1100 ft.

Limdato de aliĝo: 31 de majo 1977.

Bulgaroj sendu aliĝilojn al adreso: Monda Turismo, p. k. 45, 1000 Sofio.

ORGANIZA KOMITATO de IREN, H-7601 Pécs, Pf., 2, Hungario



TRA LA E★ MONDO

Zamenhof-celebro en USSR

Sur la bordo de la bela lago Ĉebankulj (USSR) en decembro okazis tradicia Zamenhof-festo, kiun partoprenis 70 esperantistoj el 5 urboj de Suda Uralo kaj Baŝkirio.

Post prelego pri Zamenhof kaj lia afero okazis koncerto, en kiu ĉiu E-rondeto prezentis sian programon (nur en Miass funkcias 7 E-rondetoj). Sekvis interesa konkurso sub titolo „Liro — 76“. En ĝi estis prezentitaj tradukoj de E-versaĵoj, originalaj kaj tradukitaj E-kantoj, plenumo de tiaj kantoj. La partopreno en la konkurso estis ĉeesta kaj foresta.

Dum du tagoj Esperan'o sonis en amikaj paroloj kaj kantoj.

Tatjana Koptjagina

POR AMASA ESPERANTO-TURISMO

De la 28-a de novembro ĝis la 5-a de decembro 1976 Pola E-Asocio kaj „Juventur“ — oficejo por eksterlanda turismo de pola junularo — estis dommastroj de gravaj por la E-turismo aranĝoj. Dank' al ilia malavara kaj ĉiufanka subteno kaj kunlaboro la II Internacia Foiro de E-Turismo kaj la estrarkunsidoj de Monda Turismo estis tre sukcesaj kaj fruktodonaj.

Ok tagoj la partoprenantoj — gvidantoj de E-turismo en Aŭstrio, Bulgario, ĈSSR, FRG, Hungario kaj Pollando — vigle diskutis organizajn problemojn de la E-turismo, vojaĝis pli ol 2000 km per aŭtobuso de „Juventur“ por vidi la ripozdomojn, kampadejojn kaj restoraciojn, kiujn „Juventur“ proponas por feriado de alilandaj turistoj-esperantistoj, ĉefe por reciproka sendeviza interŝanĝo de grupoj.

Inter „Juventur“ kaj la reprezentantoj de landaj E-organizaĵoj estis subskribitaj kontraktoj pri sendeviza E-turismo. Tio ebligis la feriadon de 2000 esperantistoj el alilando.

Ekde 1977 j. la aviadil-buslinio „Esperanto“, kiu funkcias somere inter Pollando kaj Bulgario, kaj la buslinio „Esperanto“ — inter Pollando al Hungario tra ĈSSR, estos aŭspiciataj de Monda Turismo. Tiuj linioj grave helpas la interŝanĝon de esperantistoj-turistoj kaj havas grandan propagandan signifon.

Defale estis traktita la enhavo kaj la ekster-raĵo de la tre utila helpilo por ĉiu vojaĝema esperantisto — la turisma E-kalendaro de Monda Turismo. Ankaŭ en la nova kajero

aperos informoj pri ĉiuj E-turismaj aranĝoj, se ties organizantoj siatempe informus la redaktantojn de la kalendaro. Ĝi aperos en la komenco de 1977 j.

En 1977 la bulteno „Turismo per Esperanto“ aperos kvar foje. La presadon prizorgos la nova estrarano de Monda Turismo pri informado kaj presado s-ano D. Smolič el Paderborn, FRG.

Oni konstatis, ke en landoj, kie ĝenerale E-organizaĵoj kunlaboras kun Monda Turismo pri efektivigo de la kampanjo „Esperanto en Turismo“, la aplikado de Esperanto en turisma tereno progresas.

La trarigardo de diapozitivoj „Esperanto-somero 1976“ estis interesa.

Oni povis vidi lumbildojn pri diversaj turismaj E-aranĝoj. Krom tio s-anoj D. Smolič kaj M. Finkenzeller projekciis filmojn faritajn de ili mem.

La komunumo de Bidgoŝc (Bydgoszcz) decidis aĉeti la koloran filmon pri la festo „Bydgoszcz-tagoj 1976“, kiun faris D. Smolič.

Ni havis la okazon partopreni bonajn E-aranĝojn, kie ni ĝuis programon plenumatan de esperantistoj kaj E-orkestro.

Sendube la konferenco de Monda Turismo kaj la II Internacia Foiro de E-Turismo, okazintaj en Pollando, estas grava paŝo en la disvolvo de la E-Turismo.

Nikola Nikolov

KUNVENO PRI BULGARIO EN POLLANDO

En 1976 j. du familioj el urbo Vroclavo (Pollando) partoprenis la Internacian Arkeologian Esperanto-Brigadon apud urbo Marica, Bulgario. Post la reveno en sian loĝurbon ili rakontis siajn impresojn, ilustrante ilin per fotoj, prospektoj, insignoj, esperantaĵoj kaj donacoj, kiujn bulgaraj esperantistoj faris al ili. Pro tio la esperantistaro, precipe la junularo, kun granda intereso atendis la alvebon de s-ano Nikola Nikolov el Sofio, vickomandanto de la brigado.

La 7-an de decembro 1976 en la Vroclava E-Klubejo okazis vespero dediĉita al Bulgario. S-ano Nikolov parolis pri sia suna patrujo kaj la E-brigado apud Marica.

Zbišek Denbinski projekciis kolorajn diapozitivojn, kiujn li faris dum la brigado kaj la ekskursado de la brigadanoj tra Bulgario.

La aranĝita konkurso pri Bulgario kaj ties E-movado provokis viglan intereson. Al la trafe respondintoj de la demandoj nia bulgara gasto disdonis esperantaĵojn: diskoj, insignoj, kraĵonoj, glumarkoj, etikedoj.

Multaj el la partoprenantoj de la vespero deklaris, ke en 1977 ili deziras partopreni diversajn E-aranĝojn en Bulgario.

Maria Poslušna



ĈEĤOSLOVAKIO TRIDEK JAROJN SUR LA VOJO DE SOCIALISMO

En 1975 j. la frata ĉeĥoslovaka popolo kune kun siaj multnombraj amikoj en la tuta mondo celebris la 30-an datrevenon de sia liberiĝo el la jugo de la germana faŝismo fare de la glora Soveta Armeo. Dum la pasintaj tridek jaroj sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio ĝi efektivigis profundajn revoluciajn ŝanĝojn en ĉiuj sferoj de la vivo kaj atingis rimarkindajn sukcesojn. Dank' al la estigo de socialisma sociordo kaj al la kunlaborado kun la aliaj socialismaj landoj enkadre de la Konsilio de Reciproka Ekonomia Helpe Ĉeĥoslovakio nun viciĝas inter la unuarangaj ŝtatoj de la mondo kaj grave plialtigis sian partoprenon en la tutmonda industria produktado kompare kun la nivelo antaŭ la Dua Mondmilito.

Pri la revoluciaj transformoj kaj ĉiufankaj atingoj de ĈSSR dum la lastaj 30 jaroj rakontas detale la esperantlingva broŝuro „Ĉeĥoslovakio — tridek jaroj“, eldonita en 1976 de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio kiel aldono al „Paco“ — organo de la Ĉeĥoslovaka Sekcio de Mondpaca Esperantista Movado (MEM).

La broŝuro havas 64 mezformatajn paĝojn, 20 el kiuj estas kun nigra-blankaj fotoj; eldonkvanto sufiĉe granda — 5000 ekzempleroj.

La materialo estas dividita en kvin ĉapitrojn sub la titoloj „Ekonomiko“, „Scienco kaj tekniko“, „Sociala sekureco“, „Publika instruado kaj kulturo“, „Lando de turismo“ kaj „Mallonge pri la E-movado en Ĉeĥoslovakio“. Abundas faktoj, ciferoj, komparoj. Ili donas pli ĝustan imagon pri la granda ekonomia potencio de ĈSSR kaj pri la loko, kiun ĝi okupas inter la plej antaŭenigintaj ŝtatoj de la mondo. La ĉapitro pri la Esperanto-movado, verkita de O. Knichal, estas dediĉita preskaŭ ekskluzive al la periodo de la lastaj tridek jaroj.

La eldonaĵo ebligas al la fremdlanda leganto akiri relative plenan imagon pri la atingoj de ĈSSR sur la vojo de la socialisma konstruado.

La Esperanta lingvaĵo de la libro estas senripoĉa.

D. Hagiev

Nadja Trendafilova

Verdaj ŝteloj

RAPIDA TELEGRAMO

Iris avino Vintro sur la tero, vagis kaj jam laciĝis, sed ne deziris foriri. Ŝi vokis siajn fidelajn helpantojn — la Frostojn kaj la glacian Venton, kaj diris al ili:

— Venteto, vi ekflugu supren, prenu la plej malhelajn nubojn kaj kovru la vizagon de la Suno. Frosteto, vi malsupreniru sub la neĝon kaj malpermesu al la herboj kaj la floroj ek-kreski. Ĉi-jare mi allasos sur la teron nek la printempon, nek la someron! Ĉu vi aŭdis?

— V-v-vu-u-! . . . — ekfajfis responde la Vento kaj ekflugis al la ĉielo. Tuj malheliĝis.

— Z-z-zi-i-i! . . . — ekklakis per dentoj la Frosto kaj ŝovis sin sub la neĝkovrilon.

Sube la herboj kaj la floroj dormis dolĉan vintran dormon.

— Z-z-zi-i-i! . . . — ekklakis ankoraŭ pli forte la Frosto.

La floretoj timtremis kaj malfermis okulojn.

— Laŭ ordono de avino Vintro ne-niu kuraĝu montri sin el la tero! Ĉi-jare estos nek printempo, nek somero — ekkriis ĝi kaj kruele ilin minacis per sia glaciaz fingro. Poste turnis dorson kaj foriris.

La floretoj ekverŝis perlobrilajn larmojn. Ili ĉagreniĝis, ĉar ne plu ili vidis la helon. La papilioj ne postkuros unu la alian ĉirkaŭ ili. La abetoj ne kolektos dolĉan mielon en iliaj kalikoj. La infanetoj ne plektos ilin je buntajn bukedojn kaj kronojn!

Nur la blanka Galanto ne ektimis.

— Herbetoj kaj floretoj, — ĝi diris, — ni ne devas timi la minacojn de avino Vintro. Ŝi estas forta, sed estas alia, pli forta ol ŝi!



— Kiu ĝi estas? Kiu ĝi estas? — demandis konkure la floretoj.

— La Suno! — diris la Galanto. — Jen, mi ne timas. Mi iras sur la teron por voki ĝin.

La kuraĝa Galanto leviĝis kaj traboris la neĝkovrilon per sia kapeto.

En tiu tempo la Suno batalis kontraŭ granda nuboj. La nuboj estis hirta kaj forta, sed la Suno montriĝis pli forta. Ĝi traboris la nubojn per sia fajra glavo, sur la ĉielo malfermiĝis blua fenestro kaj la Suno ekrigardis al la tero.

— Suno, Suneto! — ekkriis la Galanto.

La Suno ekvidis ĝin kaj sin aŭdis:

— Saluton, Galanteto! — Poste lumigis la teron ĉirkaŭe kaj demandis: — Sed kie estas la aliaj floretoj kaj herbetoj?

— Ili ne kuraĝas montriĝi, — diris la Galanto. — Ili timas avinon Vintro. Ĝi ne volas foriri.

— Ĉu tiel? — ekridis la Suno. — Diru al ili ne timi. Tuj ni sendos telegramon al la printempo alveni pli rapide. Kaj se montriĝos ĝi, morton al avino Vintro!

— Bonege! — ekĝojis la Galanto kaj eksonoris per sia blanka sonorigilo, por ke herbetoj kaj floroj aŭdu ĝin elsub la tero.

Kaj la Suno alvokis la varman sudan Venton kaj sendis per ĝi rapidan telegramon. En la telegramo ĝi skribis:

„Kara printempo,

Venu pli baldaŭ sur la teron. Vin atendas kun malpaciencaj floroj kaj la infanoj, la agroj kaj la kamparo!

Suneto kaj Galanto.“

El bulgara: Genka Bančeva

Por la nova esperantisto

Elvira Lippe

VERBOJ

Kian belan, kian ĉarman
mi ĝardenon havas!
La ĝardeno tutan jaron
mian koron ravas.

Pompe arboj kaj arbustoj
jam printempe floris,
vekiĝanta ter' aromis,
tagoj multkoloris.

Jen, somere ĝis tegmento
kreskos heliantoj.
De mateno ĝis vespero
sonos birdokantoj.

Sed aŭtune se alvenus
vi, amik' el foro,
vin ĝojigūs fruktoriĉo
per purpur' kaj oro.

Venu vintre! La ĝardeno —
poezi' natura,
kaj sur ambaŭ nin ŝutiĝu
neĝ' anime pura.

SONĜO

Kun rozo por renkonti iris
mi vin, el foro amikin',
kaj per la rozo mi deziris
saluti ame, frate vin.

Ho, mia rev' kun ŝipo granda
samtempe haltis en haven',
jen per la ŝipo alilanda
alvenis vi en ĉi maten'.

Sur kajo staris mi, atendis,
ĝis jam foriris lasta hom'.
La fingrojn sange dornoj fendis.
Mi lantis al soleca dom'.

Нови есперантисти,

В първото стихотворение има много глаголи. За да разберете правилно времето и наклонението на всеки от тях, най-напред си изяснете приблизително през кой месец от годината говори авторката.

Във второто стихотворение спрете вниманието си върху употребата на предлозите *per* и *kun* и определителния член *la*.

ATENTON, KEMIISTOJ!

Kemiistoj — sciencaj kaj inĝenieraj, aliĝu al la novefondita Kemia Sekcio de ISAE (prezidantō prof. S. Kawamura, 424-7 Kinastyo Huzii, Takamatu 760, Japanio). Skribu pri tio al la sekretario: Anatolo Gončarov, p. k. 11, Barnaul 99, 656 099 USSR.



Dediĉe al la Semajno de Internacia Amikeco

MIA KOLEKTO

Teksto: Asen Grigоров

Muziko: Veselin Damjanov

Valse

Mi ne ko- lek- tas mo- ne- rojn,
bil- dojn, poŝt- mar-kojn, bo- te lojn, son- ben- dojn de o- ra-
to- roj, fo- tojn de fa- maj ak- to- roj.
Mul- taj - ko- lek- tas poŝt- mar- kojn, bri- kojn, in- sig- nojn, paf-
ar- kojn, mi ko- lek- ta- das a- li- on:
Rekantajo
a- mon kaj hom- fa- mi- li- on. Pet- ro el
E- njo kaj
Pan- do so- ve- ta, el J- ta- li- o Lo-
Boj- ĉo bul- ga- roj, E- va kaj La- joŝ hun-
re- ta, Hans el la lan- do ger- ma- na
ga- roj ĉi- ujn mi ko- nas bo- ne- ge
1. kaj his- pa- ni- no Su- za- na 2. le- ge.
ni ko- res- pon- das ko-

Mi ne kolektas monerojn,
bildojn, poŝtmarkojn, botelojn,
sonbendojn de oratoroj,
fotojn de famaj aktoroj.
Multaj kolektas poŝtmarkojn,
brikojn, insignojn, pafarkojn,
mi kolektadas alion:
amon kaj homfamilon.

Refreno:

Petro el lando soveta,
el Italio Loreta,
Hans el la lando germana
aj hispanino Suzana,
Enjo kaj Bojĉo bulgaroj,
Eva kaj Lajoŝ hungaroj —
ĉiujn mi konas bonege —
ni korespondas kolege.

Se iu sentas doloron,
 ankaŭ mi sentas angoron.
 Se iu longe silentas —
 lian foreston mi sentas.
 Se venas ĝoja letero,
 signo pri bono, prospero,
 ankaŭ min tio ĝojigas,
 min al laboro instigas.

Refreno :

Bela polino Irena,
 kuracistino amplena
 kaj la japan' Kanigava —
 pentroartisto plej rava —
 kaj ĉiliano Ibero —
 la batalant' por libero —
 ĉiujn mi konas bonege —
 ni korespondas kolege.

Al kiu sentojn klarigi,
 mian zorgemon sciigi? —
 Al mia tuta kolekto
 el ĉiumonda direkto.
 Ne plenplenigas tirkestojn
 mia kolekto, nek kestojn :
 ĝi estas en la memoro,
 en la memoro kaj koro.

Refreno :

Mia angola amiko
 el la varmega Afriko
 kaj instruisto Vergilo
 el ekzotika Brazilo,
 svedo, kubano aŭ ruso,
 el nord' ĝis suda poluso —
 ĉiujn mi konas bonege —
 ni korespondas kolege.

BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

INSTRUISTA SEKCIO KAJ SOFIA DISTRIKTA ESTRARO

INTERNACIAJ KURSOJ POR INSTRUISTOJ KAJ KURSGVIDANTOJ DE ESPERANTO

1—2 de aŭgusto 1977, urbo Burgas, ĉe Nigra Maro

SUB LA AŬSPICIO DE INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ (ILEI)

A. Por lernado de la lingvo

I grado — elementa, II grado — daŭriga, III grado — supera

B. Kurso por instruarajto de Esperanto

En la kursoj estas akceptataj **prefere instruistoj kaj kursgvidantoj** (neprofesiaj E-instruistoj). La akcepto en la diversaj gradoj estas farata surbaze de dokumento pri ekzameno por la antaŭa grado.

Ĉiutage estas 4 lernohoroj, la ceteran tempon oni uzas laŭplaĉe (sur plago, en promenadoj, ekskursoj ktp.).

Limtempo de aliĝo: la 31-a de majo 1977.

Kotizo por eksterlandanoj: 110 bulgaraj levoj aŭ egalvaloro (inkluzivas nutradon, loĝadon, instruadon, administrajn elspezojn). Sumojn oni sendu al **adreso:** Bulgario, 1303 Sofio, ĉrez Bâlgarska Vânŝnotârgovska Banka do DS Kasa Blagoevski Rajon, smetka 185/2553 na Sofijskia Okrâjen Esperantski Komitet.

Ĉe neebila transpago kotizoj estos akceptataj ĉe alveno en Burgas, sed kun **anticipe averta** per la aliĝilo.

En ta komuna loĝejo oni ne rajtas havi kun si infanojn aŭ nekursanojn.

Pli detalajn informojn oni povas ricevi de: Okrâjen Esperantski Komitet, bulv. Hristo Botev 97, 1303 Sofio, Bulgario (tel. 31-00-29).

Venu perfektigi en Esperanto meze de agrabla internacia Esperanto-medio! Venu ĝui la varman bulgaran sunon kaj la ĉarmon de Nigra Maro!



672545